

Esperanto en Danio

23-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2016



Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la prezidanto:

Peter Wraae

Eremitageparken 17 st, C

2800 Lyngby

☎ 60 70 79 69 peter@wraae.dk

Ĝirokonto de DEA: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Ileana Schrøder

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45

finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.02.2017

Enhavo

Nia estraro.....	3
Progamo de KEK.....	4
Forpaso de Else Hjorth.....	5
Propedeŭtiko.....	6
DEA en la dana UN-Asocio.....	7

Kio estas la situacio de Fukuŝima?.....	8
Pacmesaĝoj tra la mondo.....	12

Novjara renkontiĝo.....	14
Malmultekosta ferio por gejunuloj.....	15
Internacia Junulara Festivalo..	16
Itala jarkongreso.....	17

Esperanto en usona filmo.....	18
Esperantologio en Pollando....	18
Grava gazeto senpaperiĝas....	20
Deklaracio pri Homaranismo. .	21

Nia estraro



Jen la estraro de Dana Esperanto-Asocio, kiu estis elektita printempe: de maldekstre Finn Østerbæk, Bent Jensenius, Peter Wraae (prezidanto), Jens S. Larsen, Arne Casper kaj Ileana Schrøder. Kiel montras ĉiu numero de ĉi tiu revuo, ni daŭre fosas nian sulkon, fidante ke guto frapanta traboros la monton granitan. UNESKO ja enskribis d-ron L.L. Zamenhof inter la proponojn de celebrado por la jaroj 2016-2017 (laŭ propono de Pollando, Germanio kaj Slovakio), kaj tio speguliĝas ankaŭ en la aktivadoj de DEA: prelegoj en la klubo en Kopenhago, artikoloj en ĉi tiu revuo k.s. Sed okazas ja multaj aliaj Esperantaĵoj ol tiuj pri kiuj la redaktoro informiĝas – ne forgesu sendi raporteton al eed@esperanto.dk se okazas io Esperanto-rilata en via ĉirkaŭaĵo!

Progamo de KEK

Konversacia Esperanto-Klubo kunvenas **ĉiulunde je la 19-a horo** en la “Kulturdomo” Tomsgårdsvej 35, 2430 Kopenhago NV. Bonvolu eniri la kulturdomon malantaŭe per la pordo ĉe la aŭto-parkejo.

Prepare al la 100-jara datreveno de la morto de Zamenhof venontjare, ni havos **monatan Zamenhofan Vesperon**. Ni legas prelegojn kaj leterojn de Zamenhof kaj diskutas pri ili.

7. novembro:

Studgrupo. Paŝoj al plena posedo de William Auld. Jen la tria paŝo. Betty gvidas.

14. novembro:

Babila Vespero. Venu babili pri ĉio kaj nenio.

21. novembro:

Zamenhofa Vespero. Pri la juda fono de Zamenhof. Gvidas Betty.

28. novembro:

Peter Wraae prelegos pri Martinus.

5. decembro:

Studgrupo. Paŝoj al plena posedo de William Auld. Jen la kvara paŝo.

La 11-a decembro **je la 14-a horo**: Zamenhof-festo.

Ujutna posttagmezo en la Kulturdomo en Tomsgårdsvej 35 (enirejo Birke-dommervej 43). Diversaj homoj distros, muzikumos kaj ni kantos kristnaskajn kantojn. Ni servos kafon/teon kaj kukojn. Enirpago 30 kr.

Forpaso de Else Hjorth



La 8-an de oktobro mia edzino, Else, ne plu povis daŭrigi sian vivon.

Dum la lasta jaro ŝi estis tre malsana. Tial estas la plej bona solvo por ŝi, nun esti liberigita el la fizika vivo.

Sed mankas al mi mia amata kunvivanto kaj bona amiko dum pli ol 50 jaroj. Ni havis la samajn interesojn: Esperanto, vegetarismo, klasika muziko kaj la verkaro de Martinus.

Ni kune komencis lerni Esperanton en 1989 kaj ni fondis la klubon en Aalborg la saman jaron. Else estis helpema kaj laborema. Ŝi instruis Esperanton en nia klubo. Ŝi faris tradukojn de Esperanto-tekstoj de Claude Piron kaj de Aivanho. Ŝi ankaŭ tradukis en Esperanton kelkajn artikolojn de Martinus por la revuo Esperanto-KOSMOS.

Ŝi ofte gastigis amikojn en nia hejmo kaj somerdomo kaj ĉiam faris bonegan manĝaĵon.

Por mi estas granda perdo ne plu povi dividi kun Else la ĉiutagan interparoladon kaj vivadon.

Mi estas tre dankema al Else pro la bona tempo kiun ni havis kune.

Ejnar Hjorth

Propedeŭtiko



La 9-an de aŭgusto komenciĝis instruado de Esperanto en la libera lernejo “Friskolen” en Jægerspris.

La tagon oni komencis kantante kanton en Esperanto en la matena kunveno de la tuta lernejo. De tiam ĝis la 12-a horo la 4-a kaj 5-a klasoj estis instruataj de sia instruisto Michael Branebjerg og gasta instruisto Kim J. Henriksen. Ambaŭ estas ankaŭ muzikistoj – do la instruado okazis varie kun kantoj, ludoj kaj ekzercoj.

La instruado daŭris ĝis la aŭtuna ferio, post kiu la lernantoj estos instruataj pri la germana. Enketoj montras ke la lernantoj pli rapide lernas alian fremdan lingvon lerninte antaŭe Esperanton. Tiamaniere ili ankaŭ ekkonas du lingvojn!

[Facebook esperanto-nyt]

DEA en la dana UN-Asocio



Dum la ĝenerala kunveno de la Dana UN-Asocio (*FN-forbundet*), kiu okazis en Aalborg la 29-30-an de oktobro, mi partoprenis kiel reprezentanto de Dana Esperanto-Asocio en la reprezenta komitato. Ni interalie diskutis kaj aprobis la novan principan programon de la Asocio.

Unu el la punktoj de la programo titolita “La vidpunkto de la UN-Asocio pri la mondo kaj pri UN” estis la homaj rajtoj. Mi postulis kaj sukcesis ke la “lingvaj rajtoj” eniru en la tekston pri la diversaj homaj rajtoj.

Oni ofte ne taksas la lingvajn rajtojn kiel gravan parton de la homaj rajtoj. Se oni ne tute forgesas pri ili, oni kutime pensas nur pri unu aspekto, ekzemple la lingvaj problemoj de enlandaj minoritataj grupoj, kaj ne ankaŭ pri la uzo de lingvo inter malsamlandaj kaj malsamlingvaj nacioj. Tion mi ofte spertas dum la diskutoj pri homaj rajtoj.

La plej nova ekzemplo de disputo pri lingva egalrajteco je internacia nivelo estas la ĵusa deklaro de la franca estro de la komisiono pri intertraktado de la malaliĝo de Britio el EU. Li oficiale deklaris, ke li postulas intertrakti nur en la franca lingvo, kie li sentas sin hejme. Eĉ se oni povas kompreni lin, ĉu ne estus multe pli juste intertrakti pere de la internacia lingvo, por ke la ambaŭ flankoj sentu sin samrangaj?

Ileana Schrøder

Kio estas la situacio de Fukuŝima?

La 27-an de aŭgusto 2016

La unua Internacia Kongreso de Patrinoj okazis en Svislando en 1954, la jaron kiam okazis usonaj eksperimentoj de hidrogenbomboj en la suda Pacifiko. Pro la eksperimentoj mil japanaj fiŝkaptistaj ŝipoj suferis kaj radioaktiva pluvo falis sur Japanion kaj certe sur la tutan terglobon. Pro la timo patrinoj en la tuta mondo organizis tiun kongreson, sed bedaŭrinde neniam plu okazis la internacia patrino kongreso en la mondo krom en Japanio. Nur japanaj patrinoj seninterrompe organizadas la kongreson ĉiun jaron, kaj en tiu ĉi jaro ĝi atingis la 62-an kongreson. Pro tiu historio patrinoj partoprenantaj en la kongresoj havas grandan intereson pri nukleaj aferoj, do ankaŭ en tiu ĉi kongreso, kiel senigi nukleajn centralojn el Japanio estis unu el la plaj gravaj temoj.

La fakkunsido “Energio kaj nukleaj centraloj” okazis en la gubernio Fukui, kie troviĝas 15 reaktoroj. En la kunsido patrinoj, kiuj agadas kontraŭ la nukleaj centraloj en sia gubernio, konkure surpodiĝis kaj raportis pri sia, foje sukcesa, foje malfacila, agado. Ankaŭ mi volis raporti pri mia raportado per Esperanto, sed bedaŭrinde mi ne estis akceptita. Eble oni ne bone sciis, kio estas Esperanto kaj krome mia propono estis tro internacia por la organizantoj.



Patrinoj de la gubernio Aomori raportas pri sia batalo kontraŭ la konstruata nuklea centralo Ooma.

Dum tiu kunsido mi miris pro la energio kaj entuziasmo de la patrinoj. La slogano de la kongreso estas “Patrinoj, kiuj naskas vivon, protektas kaj flegas ĝin”. Vere patrinoj estas fortaj.

Fine de la kunsido prelegis s-ro Ito Tacuja, kiu loĝas en la urbo Iŭaki, Fukuŝima, kaj laboras kiel estrarano de “Tutjapania Centro de kontraŭ-nukleenergiaj movadoj”. La temo de lia prelego estis “Ni ne plu ripetigu nukleajn akcidentojn”.

1. Nun, 5 jarojn post la akcidento en Fukuŝima

- (1) En 6 urboj damaĝitaj de la akcidento nun neniu loĝas. La loĝantaro de Fukuŝima malpliiĝis je 5,7%. Tio estas la plej granda malpliiĝo en Japanio.
- (2) Eĉ post 5 jaroj okazadas nerektaj mortoj pro la akcidento (akcident-rilataj mortoj pro malbona flegado post la Katastrofo, ŝanĝiĝo kaj malriĉiĝo de vivo, malespero, memmortigo ktp.). La nombro de rektaj mortoj pro la cunamo estas 1604, sed la rilataj mortoj estas 2006 (ĝis decembro 2015).
- (3) Ĝis komplete neniigo de la difektitaj reaktoroj oni bezonos pli ol 40 jarojn. Oni ankoraŭ ne scias, kie kaj en kia stato estas fandiĝintaj nukleaj brulaĵoj. Se oni kovros la reaktorojn per “ŝtona ĉerko” same kiel en Ĉernobil, oni devos prizorgi ilin dum la venontaj kelkcent jaroj.
- (4) La registaro planas (parte komencis) konstruigi “provizoran konservejon de poluitaĵoj,” kiu etendiĝos en ambaŭ urboj Ookuma kaj Futaba, kaj ĝi promesas, ke 30 jarojn poste ĝi transportos tiujn poluitaĵojn ekster la gubernion Fukuŝima, sed neniu kredas tiun promeson. Certe tiu fariĝos eterna konservejo.
- (5) En iuj urboj poluitaj de nukleaĵoj kaj poste “purigitaj”, nun la loĝantoj povas reveni, sed ili ne povas facile reveni pro manko de hospitaloj, vendejoj kaj aliaj necesaj funkcioj kaj pro timo al radioaktiveco.

- (6) La registaro ne havas planon senpoluigi la dense poluitajn urbojn.
- (7) Oni trovis 161 infanojn, kiuj suferas pro tiroida kancero, kaj 42, kiuj havas suspekton pri tio. Inter esploristoj kaj kuracistoj estas du opinioj. Iuj atribuas tion al la nuklea akcidento, sed aliaj ne. Aparte de kaŭzoj, oni devas varme kaj longe prizorgi tiujn infanojn.
- (8) Malharmonio okazas inter la suferantoj de la akcidento. La registaro dividis ilin per distanco inter iliaj domoj kaj la nuklea centralo, per kvanto de radioaktiveco en iliaj loĝlokoj, kaj per kvanto de kompensa mono laŭ la supraj kriterioj. Ni devas venki tiun malharmonion kaj regajni solidarecon inter la suferantoj.

2. Movadoj kontraŭ nukleaj centraloj

(1) Antaŭ la 11-a de marto 2011

- Ni batalis en la juĝejoj kontraŭ la konstruo de la nukleaj centraloj, sed malvenkis.
- “Tutjapania Centro” plurfoje avertis la registaron kaj TEPCO-n pri la danĝero de eblaj grandaj cunamoj, sed ili tute ne aŭskultis nian averton.

(2) Novaj vidpunktoj post la katastrofo:

- La movado kontraŭ la nukleaj centraloj fariĝis granda tutjapania movado, en kiu ĉiuj povas partopreni.
- La grupoj, kiuj subtenas la atomenergian politikon, ankaŭ subtenas atomarmilan politikon kaj provas ŝanĝi la 9-an artikolon de la Japana Konstitucio, kiu malpermesas militon kaj posedon de armeo. Tial ni devas havi fortan solidarecon kaj kunordigitan agadon inter niaj tri movadoj, kiuj celas protekti la vivon de la popolanoj, nome la movado kontraŭ nukleaj centraloj, la movado por aboli nukleajn armilojn kaj la movado por protekti la Japanan Konstitucion.

3. Kio estas grava por ne ripetigi nukleajn akcidentojn

- (1) Ni dividu faktojn, spertojn kaj lecionojn de la nuklea akcidento inter ni.
- (2) Ni havu komunan komprenon pri la jenaj danĝeroj de japanaj nukleaj centraloj.
 - 1) Danĝero pro manko de sufiĉa teknologio, precipe danĝero de bol-akvaj reaktoroj kaj danĝero pro kadukaj reaktoroj.
 - 2) Danĝero pro la speciala kassistemo de la elektraj kompanioj. Danke al tiu avantaĝa sistemo ili povas libere kolekti monon el la poŝo de la popolanoj, kiam ili “bezonas” ĝin kaj povas konstruigi nukleajn centralojn laŭ sia volo kaj sen financa problemo.
 - 3) Danĝero pro la geologia strukturo de la japana insularo, kie ofte okazas tertremoj kaj vulkanaj erupcioj.
 - 4) Danĝero pro geografia vidpunkto. Nukleaj centraloj situas proksime de urboj kaj vilaĝoj. En malgranda tereno de nukleaj centraloj staras pluraj reaktoroj.
 - 5) Danĝero pro manko de internacnivela regularo por kontroli la nukleajn centralojn. Ekzistas nur komitato nomata “Nuklea Reguligada Aŭtoritato”, favora al la registaro kaj la elektrokompanioj.
 - 6) Danĝero pro profitcela sinteno de la elektrokompanioj. Ekzemple, kiam okazis la grandaj tertremoj en Kumamoto en aprilo 2016, la elektrokompanio Kjuuŝuu neniam intencis haltigi la reaktorojn.
- (3) Ni havu komunan ideon por konstrui urbojn ne dependantajn de nuklea energio.
- (4) Ni havu komunan ideon pri recikla energio. Ĉie en Japanio troviĝas naturaj, recikleblaj energifontoj, kiujn ni povas utiligi laŭ la bezono de la regiono kaj per malgranda kapitalo, kaj el kiu ni povos profiti.

4. Estonteco de Fukuŝima

(1) Ĉiuj urboj en Fukuŝima postulas neniigon de ĉiuj 10 reaktoroj en Fukuŝima, tamen TEPCO kaj la registaro silentas.

(2) Fukuŝima celas, ke ĝi estu gubernio de recikla energio. Tio estos la plej granda kontraŭbato al la registaro kaj TEPCO, kaj samtempe per tio ni dankas al ĉiuj, kiuj helpas Fukuŝima-n.

Pacmesaĝoj tra la mondo

Unuan fojon mi ekpensis kolekti anglajn pacajn mesaĝojn el eksterlandaj partoprenantoj en la “Granda Manifestacio kontraŭ nukleaj armiloj” okazinta en 1984 en Tokio, por transsendi ĝian pacan etoson al miaj gelnantoj. Tiu mesaĝkolektado disvastiĝis inter instruistoj de la angla lingvo en la tuta Japanio kaj multe kontribuis al paca movado. Mi eĉ eldonis etan libron titolitan “Pacaj mesaĝoj”.

Antaŭ kelkaj jaroj mi rememoris tiun sperton kaj kolektis pacajn mesaĝojn en la Azia Kongreso okazinta en Mongolio en 2010, kaj poste en la UK en Kubo en la sama jaro. En la sekvanta jaro mi kolektis mesaĝojn pere de la Delegita Reto de UEA.

Aperis en Japanio ĉefministro Abe, kiu kontraŭas nian pacan konstitucion kaj pli kaj pli atencas demokration. Pro tio mi pli serioze kolektis pacajn mesaĝojn en la UK-oj en Lille kaj en Nitra. La nombro de kolektitaj mesaĝoj atingis 166 el 56 landoj. Vere Esperanto havas grandan forton kaj esperantistoj estas vere pacamaj kaj sinceraj. En tiuj malmultaj okazoj mi povis kolekti tiom multe da mesaĝoj!

Ĝis nun mi faris panelojn el tiuj mesaĝoj kaj montris ilin en kunsidoj, sed en efektiveco mi havis malmultajn okazojn por tio, do mi decidis fari libron el tiuj mesaĝoj.

La libro konsistas el tiuj mesaĝoj, japanaj tradukoj kaj fotoj. Por igi la libron bela, mi presigis ĉiujn fotojn en koloroj, kuraĝe elspezinte multe, sed kun malalta prezo. Mia vivo ne estos tre longa, do ŝpari monon por paco kaj Esperanto ne estas rekomendinde. Mi decidis agadi ĝis mia ĉerko per la tuta forto. Mi atendas vian mendon.

Libro-formo: A4-formato, 192 paĝoj

Prezo: 1500 enoj (15 eŭroj). Pagu al mia UEA-konto: hoy-a-p.

Sendkosto: al Eŭropo 7 eŭroj (SAL) kaj 12 eŭroj (aerpoŝto), al Azio 6 eŭroj (SAL) kaj 9 eŭroj (aerpoŝto)

Mendu ĉe: HORI Jasuo

2-13-3 Ootone

Maebaŝi, Gunma

Japanio 371-0825

Retadreso: horizonto@water.sannet.ne.jp



Novjara renkontiĝo

Fine de la jaro, de la 27-a de decembro 2016 ĝis la 3-a de januaro 2017, okazos en Saarbrücken, apud la franc-germana landlimo, la 15-a Novjara Renkontiĝo (NR) kun programo por junuloj, la 8-a Novjara Internacia Semajno (NIS).

Multfaceta programo

Ni invitas vin sperti kun ni la internacian etoson, la kunestadon de infanoj, junuloj, mezaĝuloj kaj maljunuloj, la ampleksan programon de prelegoj kaj kursoj, infana programo, vesperaj programeroj, iom da promenoj kaj ekskursoj kaj festi kun ni la novan jaron dum la silvestra nokto.

Filmeto pri la pasintjara NR

Kelkajn impresojn de partoprenintoj en la pasintjara NR kaj korusan kanton vi trovos en filmeto ĉe Youtube:

<https://www.youtube.com/watch?v=9fReKGQG8xg>

Dankon al Irek kaj lia teamo, kiuj kreis la filmon!

Ĝis nun aliĝis 109 homoj

Intertempe aliĝis jam 152 homoj – multajn nomojn vi trovos ĉe:

http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr15.php kaj

http://www.esperantoland.org/nis/partoprenantoj_nis8.php

Estas bela internacia miksaĵo – du trionoj de la partoprenantoj venas el eksterlando, el pli ol dekduo da landoj.

Aliĝis dekoj da infanoj kaj junuloj - do eble ne atendu plenan trankvilecon dum NR ...

Fino de aliĝperiodo: 1-a de decembro

La limdato por la aktuala aliĝperiodo de NR estas la 1-a de decembro. Se vi do ŝatos partopreni en NR, eble konsideru baldaŭ aliĝi – aŭ almenaŭ informi nin pri via intereso:

<http://www.esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo>

Se vi havas iujn demandojn pri NR kaj NIS, mi volonte provos respondi al vi.

Ĝuu la vivon – kaj eble kunĝui ĝin kun ni en NR/NIS.

Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand

Malmultekosta ferio por gejunuloj

Venu al Kreto en aprilo venontjare por eksterordinara evento!

De la tempoj de la grekaj mitoj, kiam Teseo mortigis la virbovon, nenio rimarkinda okazis en Kreto ĝis nun. Sed nun okazas io alia mita: junulara renkontiĝo de dek junaj esperantistoj (de 0 ĝis 35 jaroj), kiuj de la 13-a ĝis la 20-a de aprilo 2017 kunvenos en la Esperanto-domo de Annie Grente en Neapoli, malgranda urbo en Kreto. Oni devos pagi nur 5 eurojn ĉiutage por la manĝoj.

Kondiĉoj:

- ne pli ol 10 homoj
- kun malsamaj lingvoj
- progresantoj sed NE TRO SPERTAJ parolantoj de Esperanto

Por vidi, ĉu vi sukcesas eniri ĉi tiun labirinton, skribu al Annie Grente:

anniegrente@hotmail.fr

Internacia Junulara Festivalo

La 41-a Internacia Junulara Festivalo okazos en Castione della Presolana (Bergamo) inter la 12-a kaj la 18-a de aprilo 2017.

Ĉu vi volas viziti la belajn montarojn de regiono Lombardio en vilaĝo sufiĉe eta por esti trankvila kaj sufiĉe maleta por havi ĉion bezonatan? Kaj fari tion loĝante en ĉarma kaj komforta feridomo, malmulte pagante kaj tre multe amuziĝante?

Do venu al la Internacia Junulara Festivalo 2017, la plej fama junulara Esperanta renkontiĝo el Italio! Vi povos admiri belegajn pejzaĝojn, partopreni al intereseĝaj prelegoj pri multaj fakoj, spekti al koncertoj, ludi kaj renkonti kun viaj amikoj kaj samideanoj.

Jam eblas aliĝi!



La ĉi-jara temo rilatas al internacia paco kaj milita kaj religia. Grave kaj rimarkinde, la 14-a de aprilo estos la centjara datreveno de la morto de Zamenhof, kaj do speciala tago estos organizita je li.

Por pliaj kaj pli detalaj informoj kaj por aliĝi al la festivalo, vizitu la oficialan retpaĝon: <http://iej.esperanto.it/ijf/> aŭ kontaktu nin ĉe:

iej@esperanto.it

Itala jarkongreso

La Itala kongreso de Esperanto okazos en Herakleo (Matera) inter la 26-a de aŭgusto kaj la 2-a de septembro 2017.

Ekaperis la retaj paĝoj de la venontjara itala kongreso:

<http://kongreso.esperanto.it/84/bonvenon.htm>. Ili invitas vin al plongado en la pasintan tempon kaj en la nunan maron. Ĉiuokaze por partopreni la kongreson sufiĉas nur Esperanto, sed ĉar la regiono estis en la antikva tempo unu el la luliloj de la greka civilizo, vi eble volos remalkovri la radikojn de tio, kion ni nomas nun “eŭropa kulturo”, alvorte remalkovri viajn proprajn radikojn.



Laŭ la kutimo la kongreso ofertos seminariojn kaj prelegojn ĉirkaŭ la kongresa temo. Ĉi-foje temos pri “Kulturo kaj Komunikado en Eŭropo”. Krome estos ekskursoj kaj veperaj programoj ĉiuvespere kaj aparta junulara programo ĉiunokte.

Ne maltrafu la ŝancon partopreni ĉi tiun italan/mediteranean kongreson. Aliĝu jam nun.

La LKK

Esperanto en usona filmo



La filmo *Captain Fantastic* (“Kapitano Mirinda”, ankoraŭ montrata en danaj kinejoj) estas aktuala usona komedia dramo, en kiu ĉefrolas Viggo Mortensen. Ĝi premieris en la kinofestivalo Sundance en januaro kaj poste montrita en la filmfestivalo de Cannes.

En la arbaroj la gepatroj kreskigas ses infanojn per streĉa fizika kaj intelekta edukado. Pro malsano de la patrino, post jardeko la familio estas devigita forlasi sian paradizon kaj reintegrigi en la socion. Tio defias la ideojn de la patro

pri la ideala vivmaniero.

Ĉiu el la ses infanoj parolas plurajn lingvojn. En parteto de la filmo la infanoj de la familio interparolas en Esperanto. Emilio Cid el Brazilo surretigis tiun eltondaĵon ĉe Youtube kaj Vimeo, vidu:

<https://youtu.be/mTj15L0Wv5s> kaj <https://vimeo.com/188526059>.

Esperantologio en Pollando

Raporto el la interlingistikaj kursoj en Poznań en septembro

La ĉi-septembra interlingvistika sesio (17-23.09.2016) estis jam la 5-a por la gestudentoj, kiuj antaŭ du jaroj komencis siajn postdiplomajn studojn kadre de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz. 17 persistaj partoprenantoj (5 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando, po 1 el Svedio, Serbio, Ĉeĥio, Rusio, Kroatio kaj Belgio) atingis la trian jaron de siaj studoj, kiam okazas specialiĝoj. Ĉi-foje – pro la granda nombro de studentoj – povis okazi eĉ 4 specialiĝoj: pri Esperanta lingvistiko, Esperanta literaturo, internacia kaj interkultura komunikado.

La kvara, la specialiĝo pri instruado de Esperanto donis eblecon alorganizi grandan aldonan grupon da instruista trejnado: 18 personoj el 12 landoj decidis perfektigi pri instruado de Esperanto, krom la 3 el la interlingvistikaj gestudentoj. La programon gvidis d-ino Katalin Kováts kun granda kompetento kaj elano, kontribuis Zsófia Kóródy kaj prof. Ilona Koutny, pri movadhistorio d-ro Ulrich Lins. La partoprenantoj ekkonis interalie diversajn instrumentojn, instruilojn kaj internaciajn kunlaboroblojn, spertiĝis pri la pretigo de fonetikaj, gramatikaj, leksikaj kaj komunikaj ekzercoj ... Salutis en la nomo de UEA kaj gastprelegis pri la taskoj de la Jaro de la Lernanto Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA.

István Ertl prezentis la nuntempan Esperanto-literaturon por ĉiuj partoprenantoj kaj prof. Probal Dasgupta la azian kontribuon al literaturo. István Ertl kaj Tomasz Chmielik enkondukis la partoprenantojn de la literatura specialiĝo en la sekretojn de beletra tradukado, Probal Dasgupta analizis kun ili verkojn de aziaj aŭtoroj. Li gvidis kurson ankaŭ por tiuj kiuj elektis la lingvistikan specialiĝon, krome li prelegis anglalingve por kolegoj el la Novfilologia Fakultato. Prof. Zbigniew Galor traktis sociologiajn aspektojn de komunikado, interalie ankaŭ esplormetodologion kaj Ilona Koutny la lingvajn aspektojn. Kontribuis al la programo Barbara Pietrzak per Esperanta radiofonio kaj Roman Dobrzyński pri spertoj en filmfarado kaj ĝia aplikado en instruado.

La sesio pasis en tre bona kaj internacia etoso. La komuna vespero ebligis artan prezenton de la partoprenantoj (ekzemple Suso Moinhos prezentis sian novan poemaron, Anna Bartek kantis). La semajnon fermis la kultura festivalo Arkones kun multaj interesaj programeroj, parte kompletigante la temojn de la studoj. Okazis memorkunsido dediĉita al du elstaraj esperantistoj mortintaj en tiu ĉi jaro: Michel Duc Goninaz kaj Detlev Blanke, kiuj kontribuis al la Interlingvistikaj Studoj.

La grandnombran partoprenon de interlingvistikaj studentoj multe helpis la malavara subvencio de ESF kaj ĝia kampanjo AMU Poznanon, la

monkolekta kampanjo de edukado.net kaj kvin partoprenantojn de la unujara instruista trejnado mone subvenciis ILEI.

Dankon al ĉiuj subtenantoj.

[*edukado.net*]

Grava gazeto senpaperiĝas

En la ĉi-jara septembra numero de “La Ondo de Esperanto” estas teksto, kiu alportas tute novan informon pri la iniciatinto de Esperanto. La eldonanto Aleksander Korĵenkov trovis en la Ŝtata Ruslanda Biblioteko en Moskvo, (eksa Biblioteko Lenin) ĝis nun nekonatan presaĵon de Zamenhof. Ĝi aperis en Peterburgo en la jaro 1886, do unu jaron antaŭ la apero de la Unua Libro.

Temas pri grandformata tripaĝa “kajero”, kiu enhavas okversan kantaĵon de Zamenhof kun muziknotoj de Rozenoer. Ĝi estas verkita en unu plia Praesperanto kaj presita per literoj de la tiutempa rusa alfabeto, dum la muzikaj indikoj (italaj) estas latinliteraj. Ĉu vi volas scii pli multe pri ĉi tiu sensacia trovaĵo? Abonu “La Ondon” aŭ atendu ĝian publikigon en

<http://esperanto-ondo.ru/>, probable je la Zamenhofa Tago.

Eĉ pli grave, la eldonanto kaj redaktoro de “La Ondo” anoncas gravan ŝanĝon, nome: Ekde 2017 “La Ondo de Esperanto” aperos ne plu papere, sed nur elektronike laŭ la normoj pdf kaj ePub.

Pli detale pri la abonkondiĉoj legu en la retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.



Deklaracio pri Homaranismo

La centjariĝo de la forpaso de L.L.Zamenhof en 2017 estas solenaĵo por ĉiuj esperantistoj. Tiukaze ni prezentas kelkajn el liaj pli gravaj tekstoj en ĉi tiu kaj la sekvaj numeroj de Esperanto en Danio. Ni komencas per lia Homaranismo, kiun li komencis difini jam en 1901, tiam sub la nomo Hilelismo. Hilel estis juda rabeno samtempa kun Jesuo Kristo, sed Zamenhof sekve komprenis ke estus ne sufiĉe neŭtrale nomi interreligian ponton per nomo prenita el unu religia komunumo.



Antaŭparolo

La ĉi tie donata Deklaracio prezentas mian politika-religian kredon.

Ĉar oni konas min kiel aŭtoron de Esperanto, tial multaj personoj eble identigos la homaranismon kun Esperanto aŭ kun la tiel nomata “interna ideo de esperantismo” — tio tamen estus eraro. Dum la esenco de Esperanto estas plena neŭtraleco kaj la esperantisma ideo prezentas nur ne difintan fratecan senton kaj esperon, kiujn nature naskas la renkontiĝado sur neŭtrala lingva fundamento kaj kiujn ĉiu esperantisto havas plenan rajton, ne sole komentarii al si tiel, kiel li volas, sed eĉ ĝenerale akcepti aŭ ne akcepti ilin — la homaranismo estas speciala kaj tute difinita politika-religia programo, kiu prezentas mian kredon pure privatan kaj la aliajn esperantistojn tute ne koncernas.

Mi antaŭvidas tre bone, ke la malamikoj de Esperanto uzos mian deklaron pri homaranismo kiel batalilon kontraŭ Esperanto, kaj mian pure privatan principaron ili prezentos al la mondo kiel devigan

principaron de ĉiuj esperantistoj. Tio estas la kaŭzo, pro kiu mi dum tre longa tempo havis la intencon aŭ tute ne publikigi mian kredon, aŭ publikigi ĝin anonime. Sed mi forĵetis tiun intencon, ĉar mi trovis, ke tio estus nepardoninda senkuraĝeco. Tamen, por tute liberigi la esperantistojn de ĉia suspekta solidareco kun miaj privataj politikaj kaj religiaj konvinkoj, mi dum la oka universala kongreso de Esperanto publike formetis de mi ĉian oficialan rolon en la aferoj de Esperanto.

Ne por la celo de propagando mi publikigas nun mian kredon; mi simple deziras, ke miaj amikoj konu mian kredon, por ke ilin ne mirigu mia rilato al tiu aŭ alia politika aŭ religia demando kaj por ke la personoj, kiuj havas la samajn principojn kiel mi, sciu ke ni estas samprincipanoj.

Varsovio, Majo 1913.

L. L. Zamenhof

Deklaracio pri Homaranismo

Mi estas homarano: tio signifas, ke mi gvidas min en la vivo per la sekvantaj principoj:

I.

Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentoreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

II.

Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

III:

Mi konscias, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj, kian ajn supozatan devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas; la identigadon de la interesoj de lando kun la interesoj de tiu aŭ alia gento aŭ religio kaj la pretekstadon de iaj historiaj rajtoj, kiuj permesas al unu gento en la lando regi super la aliaj gentoj kaj forrifuzi al ili la plej elementan kaj naturan rajton je la patrujo, mi rigardas kiel restaĵon el la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo.

IV.

Mi konscias, ke ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti nomon neŭtrale-geografian, sed ne la nomon de ia gento, lingvo aŭ religio, ĉar la gentaj nomoj, kiujn portas ankoraŭ multaj landoj de la malnova lando, estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia deveno. Ĝis la tempo, kiam tiuj landoj ricevos nomojn neŭtralajn, mi devas almenaŭ en interparolado kun miaj samprincipanoj nomi tiujn landojn laŭ iliaj ĉefurboj kun aldono de la vortoj “regno”, “provinco” k.t.p.

V.

Mi konscias, ke en sia privata vivo ĉiu homo havas plenan kaj nedisputeblan rajton paroli tiun lingvon aŭ dialekton, kiu estas al li plej agraba, kaj konfesi tiun religion, kiu plej multe lin kontentigas, sed en komuniĝado kun homoj de aliaj lingvoj aŭ religioj li devas peni uzi lingvon neŭtralan kaj vivi laŭ etiko kaj moroj neŭtralaj. Mi konscias, ke por samregnanoj kaj samurbanoj la rolon de lingvo neŭtrala povas ludi la lingvo regna aŭ tiu kultura lingvo, kiun parolas la plimulto de la lokaj loĝantoj, sed ke tio devas esti rigardata nur kiel prooportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto, sed ne kiel ia humiliga tributo, kiun ŝuldas gentoj mastrataj al gentoj mastrantaj. Mi konscias, ke en tiaj lokoj, kie batalas inter si diversaj gentoj, estas dezirinde, ke en la publikaj institucioj

estu uzata lingvo neŭtrale-homa, aŭ ke almenaŭ krom la gentlingvaj kulturejoj tie ekzistu ankaŭ specialaj lernejoj kaj kulturaj institucioj kun lingvo neŭtrale-homa, por ke ĉiuj dezirantoj povu ĉerpi kulturon kaj eduki siajn infanojn en senŝovinisma spirito neŭtrale-homa.

VI.

Ĉar mi konscias, ke la reciproka malpaco inter la homoj neniam ĉesos, ĝis la homoj al kutimiĝos starigi la nomon “homo” pli alte, ol la nomon de gento, kaj ĉar la tro nepreciza vorto “popolo” ofte donas kaŭzon al genta ŝovinismo, disputoj kaj malbonuzoj kaj ofte malame dividas inter si la filojn de la sama lando aŭ eĉ de la sama gento, tial je la demando, al kiu popolo mi alkalkulas min, mi respondas: mi estas homarano; nur tiam, kiam oni demandas min speciale pri mia regno, provinco, lingvo, deveno aŭ religio, mi donas pri tio precizajn respondojn.

VII.

Mia patrolando mi nomas tiun landon, en kiu mi naskiĝis; mia hejmlando mi nomas tiun landon, en kiu mi estas konstanta, fikshejma loĝanto. Sed ĉar pro la nedifiniteco de la vorto “lando” la vortoj “patrolando” kaj “hejmlando” estas neprecizaj kaj ofte kaŭzas disputojn kaj malpacon kaj malamike disigas inter si la filojn de la sama terpeco, tial en ĉiuj dubaj okazoj mi evitas tiujn neprecizajn vortojn kaj uzas anstataŭ ili la pli precizajn vortojn “patruja regno”, “patruja regiono”, “patruja urbo”, “hejma regno”, “hejma regiono”, “hejma urbo”.

VIII.

Patriotismo mi nomas la servadon al la bono de ĉiuj miaj samhejmanoj, kian ajn devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas. La servadon speciale al la intereso de unu gento aŭ la malamon kontraŭ alihejmuloj mi neniam devas nomi patriotismo. Mi konscias, ke profunda amo al sia patrujo kaj al sia hejmo estas afero tute natura kaj komuna al ĉiuj homoj, kaj nur nenormalaj eksteraj cirkonstancoj povas paralizi tiun tute naturan

senton. Tial se en mia hejmo ĉiuj laboroj estas ekspluatataj por la oportuneco aŭ gloro de unu speciala gento kaj tio paralizas mian entuziasmon por socia laborado aŭ eĉ devigas min reveni pri alia hejmlando, mi ne devas malesperi, sed mi devas min konsoli per la kredo, ke la nenormala stato en mia hejmo pli aŭ malpli frue pasos kaj miaj filoj aŭ nepoj plene ĝuos tiun fortigan entuziasmon, kiun en mi paralizis la maljusteco de miaj samhejmanoj.

IX.

Konsciante, ke lingvo devas esti por la homo ne celo, sed nur rimedo, ne disigilo, sed unuigilo, kaj ke la lingva ŝovinismo estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de malamo inter la homoj, mi neniam gentan lingvon aŭ dialekton devas rigardi kiel mian sanktaĵon, kiel ajn mi ĝin amus, nek fari el ĝi mian batalan standardon. Kiam oni min demandas speciale pri mia lingvo gepatra, mi nomas senŝovinisme tiun lingvon aŭ dialekton, en kiu mi en mia infaneco parolis kun miaj gepatroj; kiam oni min demandas speciale pri mia lingvo persona, mi — gvidante min per neniamaj ŝovinismaj konsideroj — nomas tiun lingvon, kiun mi persone plej bone posedas aŭ plej volonte uzas; sed kia ajn estas mia lingvo gepatra aŭ persona, mi devas posedi ankaŭ tiun neŭtrale-homan lingvon, kiun miaj samtempuloj uzas por rilatoj intergentaj, por ke mi ne bezonu miakulpe altrudi al aliuloj mian lingvon kaj por ke mi havu moralan rajton deziri, ke aliuloj ne altrudu al mi sian, kaj por ke mi povu sur senŝovinisma bazo servi al la kulturo neŭtrale-homa.

X.

Konsciante, ke religio devas esti nur afero de sincera kredo, sed ne ludi la rolon de hereda genta disigilo, mi nomas mia religio nur tiun religion aŭ religianstataŭantan sistemon, je kiu mi efektive kredas. Sed kia ajn estas mia religio, mi konfesas ĝin laŭ neŭtrale-homaj principoj “homaranaj”, kiuj konsistas en jeno:

a) La plej altan por mi ne kompreneblan Forton, kiu estas la kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materia kaj morala, mi povas nomi per la nomo “Dio” aŭ per alia nomo, sed mi konscias, ke la esenco de tiu Forto ĉiu havas la rajton prezenti al si tiel, kiel diktas al li lia prudento kaj koro aŭ la instruoj de lia eklezio. Neniam mi devas malami aŭ persekuti iun pro tio, ke lia kredo pri Dio estas alia ol mia.

b) Mi konscias, ke la esenco de la veraj religiaj ordonoj kuŝas en la koro de ĉiu homo sub la formo de konscienco, kaj ke la ĉefa por ĉiuj homoj deviga principo de tiuj ordonoj estas: agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi: ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn, kiujn miksite kun legendoj donis al ni diversgentaj grandaj instruintoj de la homaro, kaj kiel morojn, kiuj estas starigitaj de homoj kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de nia volo.

c) Se mi kredas je neniu el la ekzistantaj revelaciaj religioj, mi ne devas resti en iu el ili sole pro motivoj gentaj kaj per mia restado erarigi homojn pri miaj konvinkoj kaj herede nutri per senfinaj generacioj intergentan disecon, sed mi devas — se la leĝoj de mia lando permesas — malkaŝe kaj oficiale nomi min “liberkreda”, ne identigante tamen la liberkredon speciale kun ateismo, sed rezervante al mia kredado plenan liberecon. Kiam en mia loĝloko ekzistos komuninterkonsente aranĝita, plenforme organizita samgenta kaj sendoktrina komunumo de liberkredantoj, al kiu mi povas aliĝi kun plena kontenteco por mia konscienco kaj por la bezonoj de mia koro, tiam — por fiksi fortike kaj precize mian religian neŭtralecon kaj savi mian posteularon kontraŭ senprogrameco kaj konsekvence kontraŭ refalo en gente-religian ŝovinismon, mi devas aliĝi al tiu liberkreda komunumo tute oficiale kaj heredigeble kaj akcepti por mi ĝian neŭtralan nomon, ĝiajn komunumajn aranĝojn, ĝiajn nedevigajn neŭtrale-homajn festojn kaj morojn, ĝian neŭtrale-homan kalendaron k.t.p.; ĝis tiu tempo mi povas resti oficiale alskribita al tiu religio, en kiu mi naskiĝis, sed mi devas ĉiam aldoni al ĝia nomo la vorton “liberkreda”, por montri, ke mi alkalkulas min al ĝi nur provizore, laŭmore kaj administre.



LibroServo vendas ...

Bonvolu sendi mesaĝon al Arne Casper
(arnecasper@yahoo.com) se vi deziras mendi libro(j)n:

Arthur Conan Doyle: La ĉashundo de la Baskerviloj.
Dkr. 130,00 + afranko, tradukinto William Auld, 167 paĝoj,
Kaliningrado, 2010

RevuServo 2017

La jarfino alproksimiĝas kaj nun estas tempo por mendi revuojn.

Bv pagi rekte al nia konto reg 3409, konto 645 7274, indikante la kodo(j)n kaj ankaŭ memori ke la limdato por enpago estos

la 1-a de decembro 2016

pli poste ni ne eblos transigi la sumon antaŭ la 31-a de decembro.

Dankon !

Kodo	Nomo	abonprezo
		DKK
OdE	Ondo de Esperanto	120.- NUR RETE
NV	Naturista Vivo	120.-
LJ	La Jaro	45.-
JA	Juna Amiko	135.-
Mon	Monato	420.-
BA	Beletra Almanako	315.- -- 3 numeroj en 2017
FE	Femina	270.-
LF	Literatura Foiro	340.-

Vinnie Mott
publikigis kelkajn
fotojn el ekskurso
kiun jutlandaj
esperantistoj faris
en Viborg la 14-an
de aŭgusto.



La 21-22-an de
oktobro okazis
*Rejsemessen for
Kvalitetsrejser* (la
vojaĝa foiro pri
kvalitaj vojaĝoj) i
Øksnehallen en
Kopenhago. Ni
ĉeestis per budo.